# BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 6a — Junio-Julio 1954a

Fondita en 1908a

Redaktejo-Administrejo : ĉe la Prezidanto de R.B.L.E. : **Maur. JAUMOTTE** Avenuo De Bruyn, 44 Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de **REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA** Asocio sen profita celo, aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo: Fr. 100,-

## Nia Beneluksa Esperanto-Kongreso en Lieĝo



(*Kliŝo afable pruntedonita de „Le Monde du Travail"*)

**Sur la ŝtuparo de la Urbdomo, la membroj de la urbestraro, kiuj akceptis la kongresanojn, kun la gvidantoj de la diversaj Ligoj kaj kun parto de la kongresanaro.**

**En la mezo de la unua rango: la Skabeno Arets, kun edzino kaj kun S-ino Maréchal, konsilantino, kaj la aliaj oficialuloj. Maldekstren: S-ro De Brouwere, prezidanto de Flandra Ligo.**

**Sur la dua rango: meze, inter la skabeno kaj lia edzino: S-ro Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., kun maldekstren: D-ro Van Gindertaelen, prezidanto de la Kongreso, kaj S-ro J. Soyeur, sekretario de la L.K.K.**

**Sur la tria rango, meze: S-ro Desonay, prezidanto de la L.K.K. kaj maldekstren: D-ro Kempeneers, prezidanto, kaj S-roj Maertens kaj Sielens, la sekretarioj de B.C.K.E.**

(*Oni povas mendi tiun ĉi fotografaĵon ĉe la liga kaj grupaj sekretarioj, kontraŭ pago de Fr. 25,—*)

*Sabaton posttagmeze*

Estas en atmosfero, kiu memorigis la senegalan temperaturon dum la antaŭa Kongreso en Antverpeno, ke la plimulto de la kongresanoj vagonare vojaĝis al Lieĝo, en tiu pentekostsabata posttagmezo.

Iom antaŭ ilia alveno en la „Arda Civito", la vetero tamen subite ŝanĝiĝis: fulmotondro kaj pluvego regis ĉe ilia alveno kaj la elementoj, dum momento, tiel furiozis, ke estis apenaŭ eble atingi la apudajn hotelojn kaj aŭtobusojn aŭ tramojn.

En la „Guillemins"-stacidomo, la alvenintoj estis bonvenigataj de membroj de la L.K.K. kaj, en la Turisma Oficejo, kiu estas en la ĉefstacio mem, ili tuj ricevis koverton kun ĉiuj dokumentoj ... multnombraj dokumentoj, tre interesaj...sed eble tro multnombraj por ke la kongresanoj ilin tuj serioze povu priatenti ekde l'komenciĝo aŭ eĉ dum la kongreso.

Reveninte hejme nur, la plimulto trovis i.a. la kolekton da belaj poŝtkartoj, donacitaj kun diverstaj broŝuretoj...Sed, pro tiu eventuala ne-priatento ne kulpas la L.K.K., kiu havigis al ĉiuj ĉion, kion ili povis deziri, laŭ orientiga vidpunkto.

La kunvenoj estis aranĝitaj en la bela salono de „Vénitien", unu el la grandaj ejoj de Lieĝo kaj kie efektive, je la 16,30a h., malfermiĝis la jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto, kiun prezidis S-ro Maur. Jaumotte, administranto-prezidanto, kiu aprobigis la bilancon kaj la kalkulon pri perdoj kaj profitoj kaj respondis al diversaj demandoj faritaj de akciuloj.

*Laborkunsidoj*

Je la 17a, komenciĝis la laboroj de la Ligoj, kiuj kune organizis la Kongreson; krom de L.E.E.N., la nederlanda asocio, kiu ja akceptis kun-organizi tiun ĉi Beneluksan Kongreson, sed kiu tamen konsideris ke ĝi ne povis, - tiun ĉi jaron, - inciti siajn membrojn forvojaĝi eksterlanden, kiam la Universala Kongreso estas baldaŭ okazonta en propra lando, kaj kiu tial ne antaŭvidis specialajn kunvenojn.

Kelkaj nederlandaj amikoj, gvidataj

**Universala Kongreso 1955**

**La estraro de UEA decidis, en sia paska kunsido ke la venonta Kongreso okazos en Bologna (Italujo).**

**Ni notu ke tiu kongreso unuflanke estas la 40-a U.K. kaj ke en 1955 estos pasintaj 50 jaroj post la I-a U.K., kiu okazis en Boulogne-Sur-Mer (Francujo).**

de S-ro Weeke, vicprezidanto, tamen veturis Lieĝen kaj, en plej bona harmonio, kunlaboris kun la membroj de la du Ligoj en Belgujo.

S-ro De Brouwere prezidis kunvenon de la Ligestraro de Flandra Ligo, dum S-ro Jaumotte, la nova prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista, prezidis laborkunsidon, en kiu la plej grava temo pridiskutita estis tiu de la Internaciaj Foiroj kaj Esperanto.

S-ino Lecat raportis pri tiu temo kaj ŝi alportis tre detalajn klarigojn pri enketo, kiun ŝi faris ĉe la esperantistoj de diversaj landoj, kiuj persone interrilatis aŭ ankoraŭ interrilatas kun la estraroj de la diversaj Foiroj. Ni aparte konigos kelkajn el la informojn kunigitajn en tiu tre interesa raporto.

*La Solena Malferma Kunsido de la Kongreso.*

Post la vespermanĝo, kiun ĉiu laŭvole havis en „Vénitien" aŭ en apuda restoracio, ĉiuj rekunvenis, je la 20a horo, por la Solena Malferma Kunsido, kiun prezidis D-ro Th. Van Gindertaelen, kiu, laŭ interkonsento en B.C. K.E., estis indikata por tiu ĉi funkcio.

Sur la podiumo, la prezidanto estis ĉirkaŭata de D-ro P. Kempeneers, estrarano kaj speciala delegito de U.E.A.; de S-ro Weeke, vicprezidanto de L.E.E.N.; de la ligaj prezidantoj S-roj G. De Brouwere kaj M. Jaumotte, kaj de S-roj Desonay kaj Soyeur, respektive prezidanto kaj sekretario de la L.K.K.

S-roj Desonay, nome de la lokaj organizintoj, kaj Van Gindertaelen, nome de la Kongresestraro, bonvenigis ĉiujn en Lieĝo kaj deziris al ili plej komfortan restadon kaj fruktodonan laboron.

D-ro Kempeneers, unue, nome de U.E.A. kaj la aliaj prezidantoj, nome de la tri Ligoj, aldonis sian salutvorton al la jam esprimitaj bonvenigoj.

S-ro Weeke anoncis ke la proksima Beneluksa Kongreso okazos en Utrecht. Tiu ĉi anonco estis aplaŭde akceptata.

S-roj De Brouwere kaj Jaumotte akcentis la bonan harmonion, kiu ekzistas en la lasta tempo inter ĉiuj esperantistoj en la lando kaj substrekis la diversajn paŝojn, kiuj estis farataj en la lasta jaro por pli kompleta harmoniigo de la komuna propaganda laboro kaj kiuj evidentiĝis al ĉiuj per la starigo de la Belga Centra Komitato Esperantista. Kaj ambaŭ certigis, ke la estraroj de la du Ligoj havas la nepran volon daŭrigi ankoraŭ, ĉiam pli, tiujn klopodojn.

Kaj la vespero estis daŭrigata, ne plu per paroladoj, sed per la ĉeesto de bonege sukcesinta

*Kabureda Vespero*

al kiu partoprenis parto de la teatra sekcio de la Antverpeno Grupo „La Verda Stelo", nome S-ro K. Amerijckx, bonega kantisto; F-inoj J. kaj M. Amerijckx, skeĉludantinoj kaj dancistinoj plej plaĉaj; S-ro J. Vinck kaj Ch. Van Gompel, kiuj, la unua, partoprenis al diversaj numeroj kaj la alia interligis tiujn numerojn per la rakontado de amuzaj ŝercoj. Tre trafe akompanis la kantojn kaj dancon, ĉe la pianoforto, F-ino Clara Peeters, dum S-ro Van der Stempel, de la Brusela Grupo Esperantista, enkondukis aŭbaŭ partojn de tiu programo, per atente aŭskultata pianoludado.

Kaj, - kvankam neanoncite sur la jam presita programo -, la Bruĝa Grupo „Paco kaj Justeco" kompletigis tiun belan programon per kvin skeĉoj, kiujn sprite prezentis S-ro Roose, kiu mem ludis gravajn roletojn, kun sia edzino S-ino Roose-De Keersgieter kaj kun S-roj Maertens kaj Iserentant, dum F-ino Van Parijs, de la frata Bruĝa Grupo, bonvole anstataŭis forrestintan samideaninon.

Resume, la prezentado estis unu el la plej bonaj, prezentitaj dum nacia kongreso en Belgujo. Kaj ĉiuj artistoj estis longe kaj varme aplaŭdataj.

## UEA, kandidato por la Pacpremio de Nobel

La norvega parlamentano Carl Henry sendis al la Nobel-komitato proponon pri UEA kiel kandidato por la Pacpremio de Nobel por 1954. Al la propono estas aldonita ampleksa dokumenta materialo pri la paciga laboro de UEA. La Nobel-komitato konfirmis al s-ro Henry la bonordan ricevon de la propono.

Antaŭ kelka tempo la Nobel-komitato decidis ne plu publikigi la listojn de kandidatoj, sed permesis al la proponintoj, mem publikigi informojn pri siaj proponoj. S-ro Henry rajtigis min, en ĉi tiu maniero konigi al la esperantistaro lian proponon.

(Bonvolu ne sendi dankleterojn aŭ ion ajn al s-ro Henry aŭ al la Nobel-komitato).

C. STöP-BOWITZ.

## LA DIMANĈA TAGO

La Dimanĉa tago komenciĝis, por la katolikaj kongresanoj, per Di-servo en la Preĝejo de la Sta.Sakramento kaj dum kiu Abato Muller, el St. Vith, faris predikon en plej pura Esperanto. Li estis atente aŭskultata, ne nur de la kongresanoj, sed ankaŭ de la ordinaraj vizitantoj.

Je la deka, estis antaŭvidataj kunsidoj: jara, por Flandra Ligo Esperantista, kaj solena, por Reĝa Belga Ligo Esperantista.

*La Solena Kunsido de R.B.L.E.*

Ĉe la estrara tablo, S-ro M. Jaumotte, prezidanto, estis ĉirkaŭata de D-ro P. Kempeneers, prezidinto; S-ro J. Soyeur, vicprezidanto, S-ro H. Sielens, ĝenerala sekretario-kasisto kaj S-ro Weeke, vicprezidanto de L.E.E.N.

Post bonveniga vorto de la prezidanto al tiuj, kiuj alvenis nur dimanĉmatene, ricevis la parolvicon S-ro Soyeur, por la legado de bonege verkita, detala kvankam ne longa, raporto pri la agado de la Ligo dum 1953a.

Poste, S-ro Sielens legis la ciferojn, kiuj rilatas al la kaslaboroj efektivigitaj, pasintan jaron, de la intertempe eksiĝinta S-ino Plyson, al kiu S-ro Jaumotte direktis varmajn dankvortojn, dum li esprimis la esperon, ke ŝia tasko en la estraro estos nur momente interrompata sed ke ŝi, post iom da ripozo kaj pripenso, reakceptos efektivan laboron. Li donacis al ŝi belan florgarbon.

S-ro Jaumotte ankaŭ dankis ĉiujn kiuj, en la estinteco, helpis D-ron Kempeneers kaj tutspeciale tiujn, kiuj bonvolis daŭrigi sian helpon ĉe la renovigo de la estraro, kaj, en unua loko, S-rojn Sielens, Soyeur kaj Pilloy.

Li tiam sin direktis al D-ro Kempeneers, kies grandajn kvalitojn kaj laborkapablon li substrekis kaj kiun li gratulis pro la farita laboro, dum li esprimis la esperon, ke tiu for-meto de posteno signifos nur aliigon de la formo de la kunlaboro en la ĝenerala propagando.

Li komunikis, ke la estraro decidis doni al D-ro Kempeneers la titolon de „emerita prezidanto"...kiun li tamen portu nur, kiam li ne plu povos daŭrigi la taskojn, kiujn R.B.L.E. ankoraŭ konfidas al li...ĉar tiu titolo neniumomente povas signifi por D-ro Kempeneers, inviton al pensiumiĝo kia ajn.

S-ro Jaumotte pinglis sur la bruston de la emerita prezidanto la unuan ekzempleron de la juskreita medalo de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

S-roj Castel, Poupeye kaj Verstraeten aldonis siajn laŭdojn, gratulojn kaj dankojn al tiuj de la Liga Prezidanto, respektive nome de la brusela, bruĝa kaj antverpena sekcioj de R.B. L.E. Ĉiu aparte donacis memorajon nome de sia grupo; S-ino Schoofs aldonis belan albumon pri la urbo Antverpeno, dum floroj estis prezentataj al S-ino Kempeneers.



Kiel konkludo de tiu ĉi honorigo, S-ro Jaumotte donacis al D-ro Kempeneers belan buston de D-ro Zamenhof, speciale verkita de la Antverpena artisto Everaerts.

Vere emociita, D-ro Kempeneers respondis, dankante ĉiujn pro la vortoj, la donacoj kaj ĉiuj amikajoj. Li promesis daŭrigi sian kunlaboron, kiel komitatano kaj estrarano de U.E.A., kiel prezidanto de B.C.K.E. kaj ĉiel kiel li povos. Li alvokis ĉiujn daŭrigi sian kunlaboron kaj grupiĝi ĉirkaŭ la nova prezidanto.

S-ro Sielens, petinte la parolvicon, nepre volis akcenti, ke tiu nova prezidanto, jus antaŭ kelkaj tagoj, jubileis pro 25jara aktiveco en la Ligestraro, kiel kasisto, ĝenerala sekretario, direktoro de Belga Esparantisto kaj vicprezidanto.

Li speciale substrekis, ne nur la senlaciĝemon, sed ankaŭ la sindonemon kaj ĉiam entuziasmigan laboremon de S-ro Jaumotte, sur kies bruston li pinglis la duan oran ekzempleron de la juskreita medalo.

La ĉeestantoj longe aplaŭdis, dum oni, ankaŭ al S-ino Jaumotte, donacis belajn florojn.

S-ro Jaumotte respondis ke, feliĉe, li bezonas nur kvar ĝis kvin horojn da nokta dormado kaj ke tio lasas... kaj espereble lasos ankoraŭ longtempe al li sufiĉan liberan tempon por dediĉi sin al kelkaj aferoj tre karaj al li...kaj inter kiuj Esperanto tre certe okupas honoran lokon. Li cetere mem ne havas la impreson, ke jam tiom da jaroj pezas sur liaj ŝultroj kaj promesas daŭrigi, kvazaŭ li nun nur ekkomencus...

Kaj restis nur kelkaj minutoj por transdono de la „Antoinette Jennen"-premion al la Verviers'a Grupo, kies reprezentanto S-ro Koeune ricevis diplomon, dum, - laŭ peto de la prezidanto S-ro Hérion, - la sumo mem estis transdonota al la Fondajo Montevideo; — por fari la alvokon por la Honora Kolono de la Kongreso en Utrecht, por kiu sin ekskribigis proksimume 50 membroj; ... — por la monkolekto, kiu alportis al la Liga kaso 1.111 frankojn; por kio ĉio S-ro Jaumotte fine dankis, post legado de multaj telegramoj kaj leteroj, inter kiuj ni tutspeciale menciu tiujn de S-ino Elworthy-Posenaer kaj de S-ro Georges Van den Bossche kaj telegramojn de G-roj Faes kaj de S-ro R. Jaumotte kaj F-ino F. Meulemans.

*Oficiala akcepto en la Urbdomo*

Urĝe, ĉiuj rapidis al la Urbdomo, kie la Urbestraro estis akceptonta la kongresanaron je la 12a horo.

Estis la Skabeno Arets, kiu anstataŭis la urbestron. Li estis ĉirkaŭata de sia edzino; de S-ro Dejardin, deputito; de la gekonsilantoj S-ino Louise Maréchal kaj S-roj Grevesse kaj Lemaire, kaj de la urba sekretario S-ro Veillesse.

Post prezentiga vorto de S-ro Desonay, prezidanto de la L.K.K., la Skabeno eldiris tre belan paroladon, en kiu li memorigis la decidon, antaŭ multaj jaroj jam, de la Ligo de Nacioj, kiu estis tre favora al nia Lingvo, kaj aludis la priparoladojn en UNESKO, kiuj estos daŭrigataj tiun ĉi aŭtunon en Montivideo.

Li esprimis la esperon, ke plena sukceso povos esti atingata, tiel ke la homoj pli facile kaj pli bone interkompreniĝu.

Flue kaj plej laŭtekste, S-ro Jaumotte tradukis tiun ĉi paroladon en Esperanto, dum ĉiuj ĉirkaŭstarantoj, urbestraranoj kaj ĵurnalistoj, atente aŭskultis kaj...iom miris pro la fakto, ke nia lingvo povas esti tiel facile uzata.

D-ro Van Gindertaelen, prezidanto de la Kongreso, kaj D-ro Kempeneers, prezidanto de B.C.K.E., siavice, dankis varme la urbestraron de Lieĝo kaj la tutspeciale Skabenon Arets kaj la akceptantan delegacion.

Kaj, ĉe l' trinkado de glaso da ĉampanvino, la estraranoj havis tiam belan okazon por, - dum kvaronhoro -, propagandi nian lingvon, buŝe kaj individue, apud la diversaj eminentuloj.

Fotografado sur la ŝtuparo de la Urbdomo estis la konkludo de tiu ĉi

## La Antaŭkongreso en Antverpeno

*organizata de Belga Ligo Esperantista kaj de Flandra Ligo Esperantista okaze de la 39a Universala Esperanto-Kongreso en Haarlem (Nederlando).*

**DATO** : *La antaŭkongreso okazos merkredon, ĵaudon kaj vendredon, la 28an, 29an kaj 30an de julio, kun forvojaĝo el la Skeldo-urbo la 31an matene al Haarlem kie, kelkajn horojn poste, malfermiĝos la U.K.*

**ORGANIZO**: *Ĝi estas organizata en kunlaboro inter Flandra Ligo Esperantista kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista. kiuj ambaŭ indikis la samajn estraranojn, kiuj pasintjare organizis la brile sukcesintan Beneluksan Esperanto-Kongreson en Antverpeno:*

*S-ro Maurice JAUMOTTE, prezidanto*
*D-ro Theo VAN GINDERTAELEN, vicprezidanto*
*S-ro Henri SIELENS, sekretario*
*S-ro Achille PITTOORS, kasisto*
*S-ro Fernand VOLDERS, festestro*
*S-ro Jules VERSTRAETEN, propaganda sekretario.*

**KOTIZO**: *La kotizo por la antaŭkongreso estas* **bfr. 50.** *Tiu kotizo estas pagota al Poŝtĉekkonto No. 4089.41 de aŭ poŝtmandate al S-ro A. PITTOORS, Ten Eechovelei, 125 DEURNE-Antverpeno.*

**LA PROGRAMO** : *La provizora programo kunmetita de la L.K.K. aspektas jene:*

**Merkredon la 28an de julio :**

**Antaŭtagmeze**: *Malfermo de la akceptejo. Unua kontakto kun la urbo.*
**Posttagmeze**: *Malferma kunsido kaj bonvenigo de ĉiuj partoprenuntoj ; Vizito al la Plantin-Muzeo.*
**Vespere** : *Interkonatiĝa Vespero - Balo.*

**Ĵaŭdon, la 29an de julio** :

**Antaŭtagmeze**: *Kultura horo. Oficiala akcepto en la Urbdomo.*
**Posttagmeze**: *Ŝipveturado sur la Skeldo; vizito de la haveninstalaĵoj.*
**Vespere**: *Granda Vesperfesto kun teatraĵeto, kantoj kaj skeĉoj.*

**Vendredon, la 30an de julio**:

**Antaŭtagmeze**: *Vizito al la Rubens-domo.*
**Tagmeze**: *Oficiala inaŭguro de la ,,Dro. Zamenhofstrato. Festmanĝo.*
**Posttagmeze**: *Vizito al unu el la grandaj industrioj en la antverpena regiono, kiel estas : petrolinstalaĵoj, aŭtomobilfabrikoj kaj/aŭ aliaj.*
**Vespere**: *Intima adiaŭa kunveno, en gaja atmosfero.*

**Sabaton, la 31an de julio** :

**Antaŭtagmeze**: *KOMUNA FORIRO AL HAARLEM !*

*La L.K.K. insistas por ke, nun,* senprokraste, *oni ĝiru sian aliĝkotizon aŭ sendu internacian poŝtmandaton ; kaj por ke karavan- aŭ grupestroj tuj prenu kontakton kun L.K.K.*

*Ili tiucele skribu ĉu al la sekretario: Henri SIELENS, Houwerstraat, 11 Antverpeno, ĉu al la prezidanto: Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44 Wilrijk-Antverpeno.*

memorinda akcepto.

*Festa tagmanĝo en „Vaxelaire"*

Kvaronhoro poste, ĉiuj kunsidis ĉe belaranĝitaj tabloj en rezervita salono de la grandaj magazenoj „Vaxelaire".

Kvankam honora tablo estis aranĝita, la gemanĝontoj iom dise sidiĝis kaj sekvis tiam festeneto en plej agrabla, intima atmosfero. dum kiu ne estis paroladoj, sed dum kiu ĉiuj gustumis bonajn manĝojn, menciitajn cetere sur beleta manĝokarto:

*Diversaj antaŭmanĝaĵoj*
*Kortbirda Kremo*
*Soleaĵo Dugléré*
*Pik-rostita bova lumbaĵo*
*Elĝardenaj legomoj*
*Terpomaj fritaĵetoj*
*Deserto*
*Kafo*

*La posttagmezo kaj vespero*

Posttagmeze, kelkaj vizitis la urbon, sed multaj akompanis S-ron Soyeur al Cointe. kie ili vizitis la bazilikon kaj la internacian monumentoj al militmortintoj.

Vespere, oni renkontiĝis en la special-atmosfera kaj privata dancejo de la Klubo „Beaulieu", kie kelkaj dancis kaj aliaj, intime babilante, kunsidis.

Ne estis vere esperanto- aŭ kongresa Balo, sed nur kunesto. en difinita ejo, kie ĉiuj povis renkontiĝi.

La L.K.K. ĉion aranĝis por ke tiu vespero ne iĝu tro multekosta por la kongresanoj kaj donis tiel solvon al, alimaniere, ne solvebla demando pri Kongresa Balo.

## Lieĝo

**Fidinda Raporto pri pentekosta kongreso ne pente kosta**

Valona Koko
*La „Kok' Valona" arde*
*En* Esperanto *kantis.*
*Ĉu estis nur hazarde*
*ke . . . l'suno ne konstantis?*
*Ni ĝuis en* Lieĝo
*pri ĉiu veterero*
*(escepte de la neĝo)*
*sed ĉio kun modero.*
*Modero estas virto*
*sed ĝi ne troe daŭru:*
*ke do l'valona birdo*
*plukantu kaj ne . . . fraŭlu.*

Lo-Koko
Desonay, *nobla patro,*
*kun barba emocio*
*ĝin metis en teatro;*
Soyeur, *impresario,*
*kantiĝis ĝin fervore*
*dum* Guyot *rid-teme*
*asistis ĝin suflore*
*kaj fine al kok' seme(1)*
*honorarion portis*
Plyson, *la abelino:*
*ŝi el . . . Monuj' eksportis*
*kun diligent-obstino.*

Ambaŭ Kokoj
*Inspiris ambaŭ kokoj*
*bonegan artistaron*
*el tri diversaj lokoj,*
*kaj prezidantan kvaron*
*je laŭdo reciproka*
*kaj kokolaŭdo same,*
*Per grava voĉo voka*
*instruis ili flame:*
„Robolo", „Folo", „Leen-o",
*„jen niaj antaŭnomoj,*
*„sed* Esperanto *beno*
*„nin ame faras „homoj"!*

Medito
*Mi tiam prem-tramadis*
*pensante pri ĉi amo.*
*enbrake min persvadis*
*en dua plena tramo.*
*Mi tion plumeditis*
*en* „Sankta Sakramento".*(2)*
*ĉar pastro* Muller *citis*
*el Ama Fundamento:*
*la „fajraj langoj" ventis*
*al nia kapa fronto*
*kaj ni kapablon sentis*
*. . . paroli al la mondo!*

Manĝado-dancado
*„Sen trinko ne akcepto"*
*valon-gustum' klarigis*
*kaj pro tiu koncepto*
*la urbestrar' „knaligis".*
*Ŝaŭmvin'. Fotografado.*
*Elprovo pri l'fortiko*
*stomaka . . . post manĝado.*
*Vizit' al baziliko*
*kaj post promeno pia,*
*vespere distro bala:*
*modern-dekoracia*
*medio . . . kanibala*

Ŝipado-kantado
*Al* Huy *veturis ŝipe*
*ni tra pejzaĝa belo,*
*ventkaresate . . . vipe*
*kun flirta* „Verda Stelo"
*Salon' deknaŭjarcenta*
*varmigis kaj ni kantis*
*sub gvido de l'talenta*
Jaumotte, *poste frandis*
*pri bela* Huy *kaj miris*
*ĉar multajn eklipsulojn*
*kafejoj nur altiris*
*Sed fermu ni l'okulojn . . .*

Epilogo
*En Beneluks-kongreso*
*eĉ Nederland' ne mankis.*
*Soifa (sen ekseso)*
Van Gindertaelen . . . *tankis(3)*
*Eĉ* Wegener *(la doktoro)*
*forgesis pri dieto:(4)*
*ja regis bonhumoro*
*sen ĝena etiketo.*
*Ĉagrenis forveturoj*
*en plenaplen' vagona*
*sur unu aŭ du kruroj*
*kiel . . . la kok' valona!*

*TYNEVERUM*

*1. pro la rimo; 2. preĝejo; 3. provizi per oleo aŭ benzino; 4. aŭtoro de „La arto fariĝi centjara"*

## Lundo al Huy

Kaj, ĉar neniu estis vespere tro laca, ĉiuj plej akurate retroviĝis lunde matene, ĉe la enŝipiĝejo, por la boatekskurso sur la Mozo, al Huy.

La vetero ne estis tiel bela, kiel pasintan jaron, por la ŝipveturado sur la Skeldo...Kontraŭe, dum la veturado, la aero estis iom freŝa kaj multaj rifuĝis en la keletaĝo de la ŝipo.

Ĉio tamen glate okazis kaj, je la indikita horo aŭ eĉ iom antaŭe, ni alvenis en Huy, kie la kongresanaro estis bonvenigata de la prezidanto de la „Syndicat d'Initiative", kiu kondukis la grupon al la salono de la „Société Royale d'Harmonie", kie atendis nin simpla manĝo, pri kiu la L.K.K. mem iom plendis ĉe la Societ-estro, sed kiu, pro la bona apetito kiun ĉiuj alportis post la Moz-veturado, tamen estis rapide formanĝita.

Pro la foresto de la Kongresprezidanto, S-ro M. Jaumotte transprenis la agrablan taskon varme danki la membrojn de la L.K.K., kiuj senlace laboris por la organizo de tiu ĉi Kongreso kaj speciale aplaŭdigis la nomojn de S-roj Desonay. Soyeur kaj Guyot.

S-ro Desonay respondis, dum ankaŭ S-ro Roose, nome de Flandra Ligo, volis speciale akcenti la kontentecon de ties membroj, kiuj, - unuafoje tiun ĉi jaron -, kongresis en la valona parto de la lando kaj plej bone memoros pri tiu ĉi Kongreso.

Atendante la delegiton de la „Sindikato" por la rondiro de la urbo, grupo da antverpenanoj, estrata de S-ro Jaumotte, aŭdigis nepreparitan kantadon; kaj baldaŭ ĉiuj foriris por iom detala promenado tra la urbeto.

Je la 4a, ĉiuj renkontiĝis en la stacidomo, de kie vagono de ĉiehaltanta vagonareto rekondukis la kongresanojn en plej bona humoro al Lieĝo.

*Adiaŭo !*

Al Lieĝo. kie la disiĝo okazis, - kiel ofte post Kongreso -, iom abrupte... Tuta grupo tamen ankoraŭ trovis la okazon por, per varma kaj laŭta aplaŭdo, speciale adiaŭ-danki la nelacigeblan trion, kiu dum la tuta kongreso estis kaj restis kun la kongresanoj.

Kaj nun jam, la Kongreso ŝajnas iom for...Sed se la Lieĝa Kongreso jam mortis...tiu de Utrecht jam montriĝas en laŭŝajne ankoraŭ iom fora estonto, sed tamen jam en plena realeco, ĉar jam pli ol 50 el la Lieĝaj kongresanoj enskribiĝis por ĝi en impona Honora Kolono...kaj pagis sian kotizon !

Honoron al tiuj honorkolonanoj !



# BELGA KRONIKO

**Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44 Wilrijk.**
**Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.**
**Generala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens, Maaldersstraat, 37 Antverpeno.**

ANTVERPENO

### Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"

*Poŝtĉeknumero: 726.54*

La 16an de aprilo - Sanktan Vendredon - la kunveno okazis en la signo de la paska atmosfero. La sinjorinoj kunportis memfaritajn objektojn kiuj rilatis al Pasko kiel ovokovriloj, korbetoj, ovingoj kaj la lotumado poste iĝis granda sukceso. F-ino E. de Winter, la animatorino, aranĝis tiun vesperon kaj plene meritis la laŭdajn prezidantajn vortojn. Siaflanke la sinjoroj pliagrabligis la vesperon per verkitaj tekstoj, kiuj rilatas al Pasko. S-ro M. Jaumotte voĉlegis ĉarman noveleton pri paska kokido. Cetere kunlaboris: S-roj R. Balleux, W. Deroisy kaj J. Verstraeten.

La 23an la vico de la teatraj elsendaĵoj estis daŭrigata per unuakta teatraĵeto: „La realeco estis tute alia", tradukita el la flandra de S-ro J. Verstraeten. Kunlaboris: F-ino F. Meulemans; S-roj R. Jaumotte, J. Montmirail kaj J. Verstraeten. La aplaŭdo denove montris ke tiaj programoj estas multe ŝatataj. Estontece tiu fakto estos serioze ekzamenata. La Prezidanto en sia dankvorto antaŭvidis la aĉeton de nova sonaparato.

La 30an F-ino P. De Ketelaere organizis amuzan vesperon. La diversaj ludoj baldaŭ kreis bonhumoran sferon.

La 7an de majo la tradicia programo: parolata jurnalo. La kunlaboro al ĝi estis tiel abunda ke la Prezidanto estis devigata peti, ke oni konservu la nelegitajn tekstojn por la proksima fojo!

La 14an paroladis F-ino H. Hofkens pri „La malnova Egiptujo", ilustrita per multaj lumbildoj. En klara tre simpla lingvo, la paroladistino skizis la vivon, la morojn kaj kutimojn de la egipta popolo kiu jam kelkajn milojn da jaroj antaŭ nia jarkalkulado kapablis starigi konstruaĵojn kiel la piramidojn. La diversajn kultojn kaj la tiamajn artojn kaj sciencojn F-ino Hofkens pritraktis kun lerteco. La Prezidanto konkludis tiun interesan vesperon kaj esprimis la dankon de la aŭskultantoj.

La 21an S-ro P. Vanderhoydonck enkondukis diskutvesperon kies temo estis: „Ĉu eblas unuura monsistemo en la mondo ?" Li komencis citante la grandajn avantaĝojn de tiu sistemo. Poste li ekzamenis la nunan mondsituacion por fini per la konigo de rimedoj, kiuj povus forhelpi la hodiaŭajn malfacilaĵojn. La debato kiu ekestis iĝis tre interesa kaj dum momentoj eĉ „tre fajra."

Dimanĉe la 23an je la 8a h. 30 verdstelanoj surprize ekskursis aŭtoĉare al la Kluisberg en Orienta Flandrio tra Bruselo, Gaasbeek (vizito al la fama kastelo), Ninove, Geeraardsbergen (tagmanĝo), Ronse. Reveno tra Gento (vespermanĝo). Alveno en Antverpeno je la 22a. La ekskurso tiel bone sukcesis ke tuj preskaŭ ĉiuj membroj enskribiĝis por nova vojaĝo al Eftingen en Nederlando. Dumvoje oni kantis multe kaj la babilado ŝercema plibonigis ankoraŭ la amikan sferon kiu regis dum la tuta vojaĝo. Tro frue venis la fino.

La 28an okazis la lasta kabareda vespero de la sezono; samtempe diplomoj estis disdonataj al la gelernintoj de la elementa kurso gvidita de F-ino H. de Ketelaere. Sukcesis en la ekzameno: F-ino R. Decock, S-ro J. De Vooght, F-ino M. Van Grootel, S-roj G. Van Gulck, J. Meulders, L. Aarts kaj M. Schepers. Kiel kutime, la Prezidanto elparolis la festparoladon en kiu li instigis la gediplomitojn daŭrigi la studadon de Esperanto. S-ro G. Van Gulck, nome de la lernintoj dankis kaj prezentis belan li-


**G. FAES**

**16, Schoenmarkt, 16**

**ANTVERPENO**

**Por via MUZIKO, RADIO kaj GRAMOFONO**


## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

HAARLEM 39a UNIVERSALA 1954 ESPERANTO-KONGRESO

*Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando*

*31-an julion - 7-an aŭguston 1954*

*N-ro 8* **OFICALA KOMUNIKO** *Majon 1954*

### L.K.K. NE PLU AKCEPTAS ALIĜOJN!

**Adreso:** Poŝtfako 140, Haarlem.
**Banko:** Rotterdamsche Bank, Haarlem.
**Poŝtĝirkonto:** 604997.

**Pagoj:** Por ĉekoj el eksterlando L.K.K. devas pagi makleron al la nederlanda banko (kutime fl. 0.50 aŭ fl. 0.90 depemde de tio, ĉu estas korespondado). Bonvolu aldoni tioman sumon al pagoj.

Nepre sendu la mendilon kaj pagon al la sama instanco, ekzemple al Peranto en via lando.

**Loĝado:** La mendoj por litoj alvenas relative malrapide. En junio la Loĝiga Servo malmendos ĉiujn litojn kiuj eventuale ĝis tiam ne estos rezervitaj kaj poste ne plu okupos sin pri loĝigado. La Loĝiga Servo meze de majo sendos al ĉiu mendinto avizilon kun la adreso de la loĝejo. Tiu avizilo estas ankaŭ legitimilo, kiun oni montru je alveno en la loĝejo.

**Oficiala Programo:** La programo de la kongreso jam estas aprobita de la Estraro de U.E.A. Tial L.K.K. ne plu povas konsideri petojn pri salonoj por kunvenoj aŭ proponojn por novaj eroj.

**Kongresa Libro:** Tiu libro kun plena programo, multaj informoj kaj listo de aliĝintoj, estos preta en komenco de junio kaj L.K.K. tuj sendos ĝin al ĉiu aliĝinto. En okazo de nericevo bonvolu vin turni al L.K.K.

**Statistiko (ĝis 30a de apr.):** Alĝerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 10, Balgujo 52, Brazilo 3, Britujo 277, Danujo 71, Finnujo 50, Francujo 236, Germanujo 260, Hispanujo 12, Indonezio 1, Irlando 5, Italujo 79, Japanujo 1, Jugoslavio 96, Kanado 4, Madejro 1, Maroko 1, Meksikio 2, Nederlando 614, Norvegujo 108, Novzelando 12, Portegalujo 7, Svedujo 271. Svislando 37, Turkujo 2, Usono 11. Sumo (el 28 landoj) 2226. (Multaj aliĝoj ankoraŭ ne estas listigitaj pro teknikaj kaŭzoj).

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

BRUGGE BRUGES

**Hôtel du Cornet d'Or**

2, Simon Stevinplaats, 2

**Centra situo - Moderaj prezoj**

**Moderna komforto**

Sidejo de «Bruĝa Grupo Esperantista»

**Tel. 314.59**

bron al F-ino H. De Ketelaere. Tiu ĉi lasta kortuŝite promesis rekomenci la gvidadon de la sekvonta elementa kurso en septembro. Post tiu solena parto la kabareda programo donis al la ĉeestantoj kelkajn agrablajn horojn da bona distrado per kantoj kaj skeĉoj. Kunlaboris: F-inoj J. kaj M. Ameryckx; S-roj K. Ameryckx, W. Deraisy, kiu prezentis amuzan kaj spritan monologon, kaj J. Vinck. Ĉe la piano F-ino C. Peeters akompanis laŭ sia lerta maniero la kantojn.

La 5an de junio denove okazis la parolata jurnalo. Krom S-ino Lecat, kiu prelegis amuzan, ruzan historion, kaj S-ro H. Vermuyten, kiu prizorgis „la angulon de la kritikanto", F-inoj M. Hofkens kaj E. Van der Weken detale raportis pri la surpriza ekskurso al la Kluisberg en Orienta Flandrio. Rimarkindan raporton (kun lumbildoj) pri la kastelo de Gaasbeek faris S-ro G. Vanderschueren.

La 5an, 6an kaj 7an la verdstelanoj partoprenis al la Beneluksa Kongreso en Lieĝo.

### Familia vivo

#### Geedziĝo

Merkrede, la 9an de junio geedziĝis S-ro Rudolf De Ketelaere, filo de S-ro M. De Ketelaere, vicprezidanto de „La Verda Stelo" kun F-ino Elvire Jacques. Al la juna paro ni esprimas niajn korajn gratulojn. Al la nova edzo ni samtempe deziras bonan vojaĝon kaj plenan sukceson okaze de lia foriro al Kongolando, kien lia ĉarma edzino lin sekvos post kelkaj monatoj.

***

Kun ĝojo, ni eksciis pri la edziĝo de F-ino Joanna Van Eynde, filino de nia bona membro kaj de sinjorino R. Van Eynde-Deneef, kun S-ro Herman Mannekens kaj kiu okazis la 12an de junio.

Al la junaj geedzoj kaj al la gepatroj niajn plej korajn gratulojn.

**Programo por la venontaj kunvenoj:**

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw" Frankrijklei, 4 je la 20,30a h. (la etaĝo)

**JULIO:** La 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: Gvidata promenado tra la urbo; la 16an: Amuza vespero organizata de S-ro K. Ameryckx; la 23an: lastaj preparoj por la antaŭkongreso; la 28 -29 -30an: ANTAŬKONGRESO.

**AUGUSTO:** La 6an: Parolata jurnalo; la 13an: Pro la antverpena libertempo: kunveno sen speciala programo: la 20an: Raportoj pri la Internacia Kongreso; La 27an: Libertempaj raportaj.

BRUĜO:

### Bruĝa Grupo Esperantista

(*Poŝtĉeknumero 4835.33*)

La 27-an de Aprilo, kelkaj elektitaj diskoj estis ludataj per la diskaŭdigilo, post mallonga komentario donata de la prezidanto.

La 4an de majo, preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj raportis pri la kermesa foiro en Bruĝo, post kio S-ro H. Schalembier kaj F-ino Yolande Van Parys raportis pri la Komerca Foiro en Bruselo. Plia leciono de la elementa kurso estis donata la 11-an de majo, kaj amuza portretludado agrabligis la lastan parton de tiu kunveno. „Belga Esperantisto" estis komune legata la 18-an de majo, kiel perfektiga ekzerco, kaj samcele la 25-an de majo estis legata el la interesa libro: „Miru-Pensu-Ridu". Multnombra delegacio sekvis la grupan flagon en la sekvantaro okaze de la inaŭguro de la monumento al la Reĝo Alberto, dimanĉon 30-an de majo. La partoprenintoj ĝuis poste agrablan kuneston en kafejo de la placo „'t Zandt".

La 1-an de junio, estis alprenataj la lastaj aranĝoj por la Beneluksa Kongreso en Lieĝo; la prezidanto montris la donacon proponotan al la Liga Prezidinto D-ro Kempeneers, nome stanan teleron kun meze ruĝkupra Bruĝa ŝildo kaj sur la randoj gravurita memorteksto; la kasisto S-ro Schalembier disdonis la ŝparitajn sumojn el la Kongresa Ŝparkaso. En la kadro de la parolata gazeto parolis F-ino P. De Staercke pri „Fernandel" kaj S-ro Ch. Poupeye pri la Monumento al la Reĝo Alberto".

De la 5-a ĝis la 7-a de junio partoprenis al la Beneluksa Kongreso en Lieĝo sep grupanoj, nome la prezidanto kun S-ino Poupeye kaj filoj Karlo kaj Marcel, kaj plie F-inoj Is. Van Parys, M. Willems kaj P. De Staercke.

Dumtempe, la dimanĉon posttagmeze, kelkaj nekongresirintaj junaj gegrupanoj ekskursis tute ne oficiale al Blankenberge.

- Pri la Lieĝa kongreso estis detala raportata dum la kunveno de la 8-a de junio.

- Multaj kontribuoj de ĉiuj ĉeestantoj plene sukcesigis la humorajan vesperon de la 15-a de junio.

**Programo de la venontaj kunvenoj.**

Ordinara kunveno: ĉiumarde ja la 20-a en la sidejo „Gouden Hoorn Cornet d'Or" Simon Stevinplaats, 2.

**JULIO:** la 6an: Legado de B.E.: la 13an: Triopa interparolado: la 20an: Parolata gazeto; la 27an: Parolado de F-ino Y. Poupeye: Vojaĝo al Rejno.

**AŬGUSTO:** la 3an: Libertempaj planoj aŭ memorajoj: la 10an: Raportado pri la Universala Kongreso; la 17an: Parolata gazeto; la 24an: Muzika vespero: la 31an: Humorajoj kaj portretludo.

**KONDOLENCOJ:**

Al F-ino Yvette DEBOO, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ŝia avo, S-ro Joseph Vandendriessche († 23-4-54).

Al S-ro Etienne DE CRAEKE, membro de la Bruĝa Grupo, Honora Prezidanto de la Bruĝa E.K.I., pro la morto de lia frato S-ro Gaston Frank DE CRAEKE, artpentristo kaj fondinto-direktoro de la teatra-organizajo „Prisma" († 12-5-54).

Al S-ro Camille TOUSSEYN el Jabbeke, membro de la Bruĝa Grupo, pro la morto de lia patrino, S-ino Tousseyn -De Bruyne († 22-5-54).

BRUSELO

### Esperantista Brusela Grupo

(*Poŝtĉeknumero: 1230.48*)

La 12-a de aprilo estis rezervita al la parolado de S-ro SWINNE, kiu estis la sekvo de lia antaŭa parolado. Enkonduke, li memorigis al lia unua prelego, ke la paco revenigas abundecon, la abundeco faligos la renton, la falo de la monrento okazigos monstrikon, la monstriko okazigas ekonomian krizon, kaj la ekonomia krizo revenigos la militon. La dua prelego estis dediĉita al la ekzameno de rimedoj por rompi tiun inferan ciklon. S-ro Swinne proponis rimedon, kiun jam uzis la ĥinoj en la pratempo, nome anstataŭigi la banknotojn. Vigla diskuto sekvis la ceteré tre interesan prelegon de S-ro Swinne.

La 18-an de aprilo (Pasko) ne okazis kunveno.

La 25-an de aprilo (dimanĉe), nia grupo organizis printempan promenadon kun vizito al la planetario. 15 gesamideanoj ĉeestis. Tie oni montris kaj klarigis la iradon de la stelaro kaj la diversajn konstelaciojn.

La 26-an de aprilo, F-ino Isaacson faris sian unuan prelegon en esperanto. Ŝi parolis pri la sekreta vivo de granda magazeno. En du partoj, ŝi trafe priskribis la vivon interne de la grandaj magazenoj, vivon, kiun la publiko ne vidas, eĉ ne konjektas. Ŝi parolis pri diversaj personoj, kies ekzistadon oni ofte ne supozas kaj kiuj tamen estas tre utilaj por la magazeno. Ankoraŭfoje gratulojn al F-ino Isaacsen por ŝia unua bonega laboro.

La 3-an de majo, okazis la parolata gazeto. S-ino E. STAES kaj S-ro KEMPENEERS akiris la saman poentnombron: S-ino E. Staes kun sia rakonto „Fantomajo" kaj S-ro Kempeneers kun sia raporto pri la kunsido de UEA en Londono dum la paskaj tagoj. Tria estis S-ro Castel kun sia artikolo pri Medicino kaj Muziko.

La 10-an de majo, S-ro CASTEL regalis nin per vere ege ĉarmaj tradukoj de verkoj de Miguel de Unamuno kaj Alphonse Daudet. S-ro Castel montris la similecon inter du verkoj de tiuj grandaj aŭtoroj. Kvankam la unua estis filozofo, troviĝas en lia severa verkaro verketo, kiu pensiĝas al Daudet.

**Programoj por la estontaj kunsidoj:**

**JULIO:** la 5an: Parolata gazeto: la 12an: S-ro Jirousek: Okcidenta utopio aŭ Atlantido: la 19an: S-ino Heyman: Memorajoj: la 26an: F-ino Kestens: Promenado tra malnova Bruselo.

**AŬGUSTO:** la 2an: parolata jurnalo; la 9an: „KAATJE" de Paul Spaak, legota de S-ino STAES; la 16an: Konversacia leciono de S-ro VanderStempel; la 23an: Raporto pri la Universala Kongreso: la 30an: „Mia Vojaĝo en Nederlando" de F-ino Obozinski.

Por viaj esperantajoj, libroj, insignoj k. c.

**Belga Esperanto-Instituto**

26, Oostenstraat, 26

ANTVERPENO

***kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.***

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

**Tel.: 15.19.92**

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ



# TRA LA VERDA MONDO!

### Esperantista ferio en Bela Svislando

La Popola Altlernejo de Bern disponigas al la Esperantistaro sian komfortan kastelon Münchenwiler apud Murten por la aranĝo de Esperanta semajno de la 23a ĝis 29a de aŭgusto. La kastelo apartenas al la ŝtato. Signifas grandan favoron kaj bonŝancon, ke ĝi estos malfermita por tia internacia kurso. Pri la organizo respondecas Svisa Esperanto-Societo. La programo antaŭvidas perfektigan kurson kaj prelegojn de la plej konataj svisaj Esperantistoj, krome multajn ekskursojn.

Münchenwiler situas en la laga regiono de meza Svislando; Bern, Fribourg kaj Neuchâtel estas facile atingeblaj de tie. Petu la ilustritan prospekton ĉe: Svisa Espero, Hangweg 57, Liebefeld- Bern.

### Alvoko al honora konkurso

Konvena propono pri belarta statuo, kiu dekoru novan „Esperantoplaco" en la sveda hav urbo Gotenburgo, estas serĉata. La placo, la unua en Skandinavio, situas en moderna kaj vigle trafikata urboparto.

Per tiu ĉi alvoko ni turnas nin al ĉiu kapabla artdesegnisto kaj skulptisto petante pri helpo. Helpu nin per viaj ideo, sugesto aŭ pozitiva projekto kiel eble plej efektive ornami tiun placon.

La statuto esence simboligu la universalecon de Esperanto, sed ankaŭ estu alloga el estetika vidpunkto.

La tuta materialo estos ekspozicie prezentata kaj de fakuloj juĝata. La venkinta projekto por ĉiam honoros la artiston.

Por ke ankaŭ neeŭropanoj povu partopreni ni etendigas la konkurstempon ĝis la fino de decembro 1954.

La materialo estu sendata al: Esperanto-Statuo, Box 11035, **Göteborg 11**, Svedlando.

### F-ino M. Noll, 80-jara

La Patrino de la Dana Esperanto-Movado Margrethe-Caroline Noll, fariĝis 80-jara la 22-an de Majo; asertante ke Esperanto konservas junecon, ŝi ankoraŭ aktive partoprenas la E. movadon, kvankam ŝi jam en 1907 fariĝis Esperantistino. Niajn korajn gratulojn!

### Sveda UNESKO-konsilantaro invitas al Frostvallen

Sveda Instituto por kultura interŝanĝo kun eksterlando kaj Sveda UNESKO-konsilantaro invitas al la altnivela prelegsemajno en Frostavallen. Aranĝos Sveda Esperanto-Instituto, kaj inter la gravaj trak-

## LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

### Antverpeno

**M. Philips**, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
**P. van der Hoydonck-van den Buys**, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksajoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
**J. Montmirail**, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
**Morris de Ketelaere**, Oostenstraat 25, Antverpeno. Ĥemiajoj. Tel. 39.17.09
**Henny de Ketelaere**, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
**Roger Jaumotte**, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Ĉiuj anoncoj kaj reklamoj en tagjurnaloj
**K. Amerijckx**, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
**R. Vanistendael**, Dambruggestraat, 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rabato de 5 % por la membroj.
**CL. Peeters**, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.
**Firmo van Iseghem & Verstraeten**, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitrajoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
**H. Peeters**, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
**H. Jacques**, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presajoj. Tel. 33.75.38
**Verdijck**, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
**P. Peelman**, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumajoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
**Y. Ameryckx**, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltajoj.
**M. Blajwas**, Lange Kievitstraat 80, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

**KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj.**

**G. Baeten**, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81 Frizisto por sinjorinoj.
„**De Boerinekens**" (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
**A. Roels**, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
**G. Goemaere**, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
**Vandersmissen**, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperajoj, parfumajoj.
**Van Kerckhoven**, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝajoj
**R. Scheerdijk**, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj. ĝardenilaro
**Butiko Angora**, (novaj galerioj), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj; sportŝuoj

### Bruselo

| | |
|---|---|
| **Farmaciisto Jacobs**, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 | 15.26.01 |
| **Farmaciisto N. Nelis**, Meise | 59.13.73 |
| „**BONBONS SWINNE**", 77, rue de Nieuwenhove | 44.57.36 |
| **Imprimerie Lielens**, 18, rue de la Princesse | 21.10.98 |
| **CARRELAGES „Carrart"**, 19, avenue de Saŭo | 21.74.49 |
| **Viajn MEBLOJN** ĉe **S-ro Weyn**, aĉetu rue Destouvelles, 57 | 15.96.97 |
| **Libroj, Publikajoj, jurnaloj, F-ino Kestens 24**, rue Bodenbroeck | 11.71.03 |
| **Tinkturejo, senmakuligejo „DEX"** 16, rŭe Esnest Laude | 15.28.29 |

46a Jaro — N-ro 7a — Aŭgusto-Septembro 1954a

# BELGA ESPERANTISTO

Fondita en 1908a

Redaktejo-Administrejo:
ĉe la Prezidanto de R.B.L.E.:
**Maur. JAUMOTTE**
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de
**REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA**
Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo: Fr. 100,-

# 39-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

## Haarlem (Nederlando), 31-an de Julio — 6-an de Aŭgusto 1954



(foto: Gé Leenheer, Haarlem)

*D-ro W. Drees, nederlanda Ministro-Prezidanto, parolas ĉe la Inaŭguro de la 39-a U.K. en Krelage-Huis.*

Raporti pri tia Internacia evento kaj kontentigi ĉiun leganton, tiun kiu partoprenis kaj tiun kiu forestis, estas ja neeblajo!

Ni tamen volis doni al ĉiu relative kompletan bildon pri ĉiu okazajo kaj, precipe, akcenti la diversecon de la okupoj de ĉiu pri ĉio, kvankam kompreneble mankos eroj, eĉ ne neglektindaj!

Ni tamen deziras nepre substreki la bonegan organizadon de la tuto — ĉar tio estas grava afero — tiel ke la partoprenantoj, pli ol dumil, respertis aŭ ekkonis tiun unikan atmosferon de Universala Kongreso, ĉie en la mondo la sama, kvankam la medioj tre ofte evidente malsamas: sur tiu kampo, kaj cetere sur la aliaj, la organizintoj plene sukcesis kaj meritas tutkorajn gratulojn.

Ni vere ĝuis E.- impreson: estas malfacile vortigi tiun senton sed vi komprenu ke alveninto en Haarlem deziras tuj „dronigi" en ĝin: nu, la akceptejo en la stacidomo mem, la verdaj flagoj ĉie, ankaŭ sur la aŭtobusoj urbaj, la Esperanto-menuoj, la samideanoj renkontitaj, kiuj ĝenerale parolis flue nian lingvon — kvankam ŝajne estis ankaŭ t.n. turistoj (envere: E.-parazitoj!) — ĉiel kontribuis al tio.

Ni memoras kelkajn aferojn, kiuj frapis nin kiel novajoj (eble ni estas tre senspertaj kaj eraras pri tio!): la specialan poŝtstampon, kiun havigis al ĉiu kongresano la „bus"-poŝtoficejo, kiun ni ĝis nun nenie renkontis, la vastan librostandon, kie estis aĉeteb la novaj libroj kaj ankaŭ „antikvajoj", kio ŝajne estas io specife nederlanda — la afablecon de la ĉef-vendistino (s-ino Mabesoone-Visser), kiun asistis multaj kunlaborantoj, oni ja en Esperantujo ĉiam renkontas!

Ni imagis al ni la zorgojn, la sindonon, la „heroajojn", kiujn postulas la „muntado" de Universala Kongreso: ni timegas ĉe la penso ke iam tia „katastrofo" povus okazi al ni!

Tial la organizintoj, la prezidanto, P. M. Mabesoone, la KKS Mason Stuttard kaj la Prezidanto de la loka Haarlema Grupo E. De Wolf, kaj iliaj geasistantoj, ŝajnas al ni homoj tiel eksterordinaraj, kvankam „nur" Esperantistoj. Ĉar tia estas Esperantujo!

Kaj tio en lando, — oni ja ripetis tion — kie la homoj kutimas bataladi (eĉ kontraŭ la akvo!), kvankam tio estas tipa karakterizilo de ĉiu Esperantisto.

Sed tio, ke ili estas veraj Esperantistoj, signifas por ni, kaj por vi, legantoj, la plej kompletan, perfektan. — ĉi-kaze meritan, — laŭdon!